

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Marto 2002

73-a jaro, n-ro 3 (1161)

ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* **retadreso: satesper@noos.fr**

## Esperantistoj estis videblaj en Porto Alegre



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj,  
Unue ni esprimas niajn  
plej korajn bondezirojn  
al ĉiuj niaj inaj mem-  
broj okaze de la Inter-  
nacia Virina Tago - 8-a de Marto, kun  
espero ke pli kaj pli da esperantisti-  
noj aliĝos al SAT kaj plifortigos (pli-  
beligos) nian Asocion.*

*Tiu ĉi marta numero estas tre  
informa pri diversaj aktualaj okazin-  
taĵoj. Krome ni enkondukis novan ru-  
brikon : «El la ret@ SAT-diskutejo»  
kiu resume prezentas temojn kaj de-  
batojn, kiujn en pasinta monato pri-  
diskutis niaj membroj en Interreto.  
Tiel la gekamaradoj nehavantaj reta-  
liron estos informitaj kaj povos even-  
tuale daŭrigi la debaton en Sennaciu-  
lo. Mi esperas ke ĉiu trovos ion inte-  
resan.*

*Pensu pri aliĝo al la kongreso  
en kiu ni traktos tre gravajn temojn,  
kiuj certe estos decidigaj por la eston-  
to de SAT*

*Plej kamaradece al ĉiuj,  
via*

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciuolo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

**Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**



*Al niaj inaj  
kamaradoj  
gajan*

*8-an de Marto*

*deziras  
la Redakcio*

### NOVA PERANTO EN BULGARIO

Ĉar jam de pli ol du jaroj ni ne sukcesas havi kontakton kun k-do Damjanov en Bulgario kaj ne povas sekvi la kotizojn de niaj bulgaraj membroj, ni devis trovi novan peranton. Li estas:

DIMITAR KALĈEV

Ĵk «Javorov» 13-2

BG-1124 SOFIA

Bulgario

### PERANTO EN ITALIO

Nia nova landa peranto por Italio, k-do Carlo BOURLOT, Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio havas ankaŭ novan poŝtbankan konton, numero 43976158. De nun bonvolu pagi vian jarkotizon je lia nomo al tiu nova konto.

### KOREKTO DE ERARO

K-do Kurisu Kei, aŭtoro de la artikolo «Historio pri Krabŝipo» en la lasta S.R. atentigas pri grava eraro: En la paĝo 12, dekstra kolumno, linio 3 estas preseraro: «socialfaŝistojn» Devas nepre esti socialfaŝistoj, ĉar la aldono de «n» ja inversas la sencon. Bonvolu do korekti.

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# El la Mondo

## El Porto Alegre kaj Novjorko: KIA TUTMONDIGO?

En SAT, ĉi tiu demando ne praviĝas. Ni havas klaran ideon pri universaleco de la homaj valoroj, pri sennacieco por homara organiza-

### Impresa partoprenantaro en Porto Alegre

La 2a Forumo Sociala Tutmonda okazis en Porto Alegre (Brazilio) de la

arestinto de Pinochet) kiuj pledas por efika tutmonda juro preter la nacioj... ĉu konscio pri sennacieco?

La "gravaj" partoprenantoj venis el Francio, kun 6 ministroj, 3 kandidatoj al prezidenteco, kiel Jean Pierre Chevènement, Noël Mamère. Notindaj ankaŭ estis nobelpremiitoj Perez Esquivel, Rigoberta Menchú, José Saragoga, kiu ne hezitis taksi kiel kadukaj la formulojn de nunaj politikaj partioj.

### Parti-politikaj celoj

La ĝenerala konstato de la ĵurnalistoj estas, ke ĉi tiu forumo en Porto Alegre fariĝis instrumento

por la politikaj celoj de la "laborista partio"-PT, kiu re-

gas la urbon mem, la provincon Rio Grande do Sul kaj ĉi jare celas la prezidentecon de tuta Brazilio kun la kompartinda tornisto Lula, jam la 3an fojon! Amuza demagogio estas la identigo al la socialista partio de Francio.

Tamen la amiko de Lula, Fidel Castro (ĉu socialisto, la dum pli ol 40 jaroj diktatoro?) estis barita sub influo de Bernard Cassen. Same malinvitita estis José Bové, kiu tamen, silente venis. Ankaŭ la Movado de Sen teruloj ne havis oficialan programon. La agitistoj estis entute limigitaj kaj nur povis sen malordo, diskrete manifestacii. Oni devis obei la oficialan porpacan marŝadon de PT. La frustracio de sindikatistoj, komunistoj, trokistoj, verduloj, (de betono) sektuloj el ĉiuj religioj estis granda. "Kaseroladoj" tamen malvigle okazis, ĉefe obee al argentinoj kaj ties bankroto, en ĉi tiu tutmondigita karnavalo de PT, konstatitis ĵurnalistoj.

Sen PT pagis, kaj kiu pagas, regas. La urbo mem elspezis (oficiale) R\$18,4 mil, kaj la ŝtato R\$2,3 milionojn (entute + 1,5 milionoj da eŭroj). La urbestro Tarso Genro en sia "ebla utopio", insistas pri iu nova ordo



Esperantistoj estis tamen videblaj en la manifestacio

do kaj pri socialismo. La forumo en Porto Alegre montris la nebulecon de la konceptoj ĉe la partoprenantoj, dum en Novjorko (aŭ Davos) la vorto "tutmondigo" - globigo, oni diras, nun esprimas ideojn pri krevoj, katastrofoj, ĉar kiel diris la elstara, ŝatata de la liberecanoj de SAT, Noam Chomsky: "La vorto 'tutmondigo' estis alproprigita de la potenculoj por la defendo de siaj propraj interesoj". "Frato" Betto, tiu de la "liberiga teologio" ne hezitis klarigi kiel "en tutmondigo la ekonomio fariĝis ekonomio de kazino", kie la regado per ludo de kapitalisma spekulado okazas sur la verdaj feltoj de Monda Banko, Monda Organizaĵo de Komerco, borsoj kaj multaj aliaj.

31a de januaro ĝis la 5a de februaro 2002. Oni atendis 50.000 partoprenantojn, je la fermo estis deklaro pri 80.000 homoj. El 4909 organizaĵoj venis 15.230 delegitoj de 131 landoj por pritrakti 26 ĉefajn temojn kun baza ideo: "Alia mondo estas ebla" sub sugesto inter aliaj de Bernard Cassen el ATTAC. Oni do diskutis dum 108 horoj el kio rezultis pli da kaloro (varmo - se vi volas) ol lumo, ĉar pro la diverseco de opinioj ne eblis venigi rezolucion aŭ konkludon, forestis iu "unika pensmaniero"!

Iom aparte estis organizitaj 800 seminarioj, specialaj kunsidoj kiel por urbestroj (200 aŭtoritatoj), por juristoj (300 leĝuloj kiel inter aliaj Baltasar Garzon, la



Araboj en marŝo

sen Usono, sed li aldonas: "... la socialisma projekto ne estas sufiĉe klara. Ni devas reagi al la merkato kaj elimini la spekulantan kapitalon..."

Luiz Inacio da Silva (Lula) en sia demagogia retoriko aldonis: "Estas eble, ke tie (en Novjorko) oni diskutas, kiel akumuli pli da riĉaĵoj. Ni, pli bone volas dis-